

## & La kruela somero:

< Rekante 5 el 25 batoj por strofo, entute 150 paŝoj dum 2 minutoj. Poemon verkis Emba (3-4/84, Sub la signo de socia muzo. Redaktis William Auld & Stefan Maul). Baladigis, komponis kaj rekantaĵon aldonis Martin Strid (2015).>

### (#Melodio:

<:25> (

mi /dodo mimi rere dore miimi;mi soso mimi rere dore miimi;mi dodo mimi rere  
dooTi;La SoSo doTi La La;

(#Rekantaĵe: La SoSo doTi La La)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 Ne /ĝojas mi, se venas la somero ;  
en ĝia arda koro mankas amo, ; kaj  
mian karnon trasekigas ; ĝisoste ĝia  
flamo.

(×.; **Kruelas la somero.**)

'2 Se la vizaĝo soifegas roson, ; ĝi  
tremas ja en ŝviton mian vangon, ; kaj  
ĝia pluvavida tero ; elsuĉas mian  
sangan. ....

'3 Kiam la klingo de falĉil' ektintas ;  
rande de ora ocean' da greno, ; pen'  
dentgrinciga por mi ŝanĝas ; la benon je  
malbeno. ....

'4 Rifuĝi nur la Moŝta Mono povas ; al  
bordoj de la freŝo-spira maro. ; Mi  
trenas ŝarĝon kiel en la ; dezert' la  
dromedaro. ....

'5 Mi trenas ŝarĝon, besto tolerema, ;  
nur foje, se mi estas mistraktata, ;  
ekbolas en mi por momento ; sango de  
lup' malsata. ....

'6 Ne timu, la falĉilon rektigitan ; ne  
kaptos mi en tia hor' ekscita ; por puŝi  
ĝin en iun moŝtan ; mi estas ja dresita!  
.....)